

Esperanto-vivo en Svislando, 9-a parto
Elementa kurso programita, 3-a parto: Etimologio
Claude Gacond, 398-a radioprelego, 1971.05.26 & 29

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni donis al vi esperanto-tradukon de prilingvaj klarigoj, kiuj aperas en la *Elementa kurso de esperanto programita por franglingvanoj*, kiun ni nun verkas. Jen klarigoj koncerne al etimologio, kiuj povas vin interesi. Ili aperas en la kvina ĉapitro sekve al la prilingvaj klarigoj.

A.- « *En la kleraj medioj ekzistas antaŭjuĝo, kiu malfavoras la disvolviĝon de esperanto. Ni opinias, ke estas utile diri kelkajn vortojn pri ĝi.*

Cl.- *Iuj beletristoj kredas, ke nur la studo de neregula lingvo – ili diras **natura** lingvo – povas meti la studenton en kontakton kun la lingva estinteco.*

A.- *Tiuj beletristoj kredas, ke planlingvo – ili diras **artefarita** lingvo – perdis ĉiun ajn intereson koncerne al etimologio, tio estas rilate al la studo pri la vorta origino.*

Cl.- *Ili eraras pro nescio.*

A.- *Por tion montri, helpe de kelkaj ekzemploj, ni ekzamenos, kion etimologio povas alporti al studento, kiu lernas la francan vortaron pere de tiu de esperanto.*

Cl.- *Vi konstatos, ke neniuj lingvoj povas pretendi je kultura monopolo, kiel tendencas kredi tiuj kleruloj, kiuj nenion scias pri esperanto.*

A.- *Etimologio – tiu scienco, kiu studas la devenon de la vortoj – alportas al ni sciigojn, kiuj povas vin interesi, koncerne tiujn vortojn **soulier** (ŝuo), **cordonnier** (ŝuisto) kaj **ébéniste** (meblisto).*

Cl.- *Temas pri vortoj, kiuj ĵus aperis en gramatika ekzerco.*

A.- *Etimologio instruas, ke **soulier** (ŝuo) estis dirita en la mezepoko **subtel**, kio signifis **subpiedo**.*

Cl.- *La metiistoj, kiuj fabrikis tiujn **subtels** (subpiedojn) uzis ledon venantan el Kordovo, en la franca **cordoan**.*

A.- *Helpe de la sufikso **-ier** (sufikso por formi meti-nomojn), oni formis la vorton **cordoanier** por nomi tiujn led-metiistojn, el kiu la nuna franca vorto **cordonnier** (ŝuisto).*

Cl.- *Frumezepoke la mebloj estis maloftaj. Ĝis la oka kaj naŭa jarcentoj, estis la **ĉarpentistoj**, kiuj ilin konstruis. En la franca **charpentiers**.*

A.- *Je la naŭa jarcento la mebloj diversiĝis. Naskiĝis novaj korporacioj. Ni menciuj tiun de la **bahutiers** (kestoŝrankfaristoj), kiuj fakiĝis en la fabrikado de la **bahuts** (kestoŝrankoj).*

Cl.- *En la 16-a jarcento, pro la inventado de novaj iloj, la metiistoj povis fakiĝi en la konstruo de mebloj pli delikataj, en la maldikigitaj laboraĵoj, france : **ouvrages amincis** aŭ **menus** (etaĵ), kiel oni tiam diris. Ĉiam helpe de la sufikso **-ier**, oni kreis la vorton **menuisier**, por priskribi tiun profesion, el kie la nuna vorto **menuisier** (lignaĵisto).*

A.- *Fine de la sama jarcento aperis la tekniko de la plakado. Oni uzis por tiu laboro eben-lignon importatan el foraj landoj. Kun tiu ligno kaj kun la influo de la fremdaj lingvoj, ankaŭ nova sufikso ekaperas : la grek-latina finaĵo **-ist**. Tial oni nomas tiujn novajn metiistojn **ébénistes**. Kvindek jarojn antaŭe oni estus ankoraŭ dirinta **des ébéniers**.*

Cl.- *Etimologio instruas, ke la vortoj naskiĝas, vivas, naskas kaj mortas. Ifoje ili pluekzistas en iuj dialektoj. Aliffoje ili transformiĝas. Per reciprokaj pruntoj ili transiras de lingvo al alia.*

Esperanto-vivo en Svislando, 9-a parto
Elementa kurso programita, 3-a parto: Etimologio
Claude Gacond, 398-a radioprelego, 1971.05.26 & 29

A.- *Esperanto estas tre juna lingvo kompare al la franca. Sed ĝia vortaro estas ofte tre malnova. Pruntita el la ĉefaj kultur-lingvoj hind-eŭropaj, semidaj kaj aglutinaj, ĝi povas permesi studojn tre interesajn por tiuj, kiujn etimologio pasiigas.*

Cl.- *Por tiuj pasiigitoj pri etimologio ni menciuj du verkojn, kiuj alportas klarigojn koncerne al la etimologio de la vortaro de esperanto :*

A.- *En la franca lingvo : **A.B.C. d'Espéranto, à l'usage de ceux qui aiment les lettres** [ABC de Esperanto por la uzo de tiuj, kiuj ŝatas beletron] de Gaston Waringhien. 75-paĝa broŝuro.*

Cl.- *En esperanto : **Naŭlingva etimologia leksikono** de Louis Bastien. 317-paĝa libro. La naŭ lingvoj de tiu etimologia leksikono estas esperanto kaj la latina, franca, itala, hispana, portugala, germana, angla kaj rusa. »*

A.- Post tiuj etimologiaj klarigoj pri la deveno de la du francaj vortoj **cordonnier** (ŝuisto) kaj **menuisier** (lignaĵisto) sekvas etimologiaj klarigoj pri du esperantaj radikoj : **deĵori** kaj **ĉu**. Ni pensas vin interesi ilin citante en la venonta semajno.

Cl.- Hodiaŭ ni diru ankoraŭ kelkajn vortojn pri tiu programita kurso, kiun ni nun redaktas. Ĝis nun ni ĝin senpage dissendis al la petintoj. Ĉiu leciono estas akompanata de dokumentoj pri esperanto : ĝenerale unu specimena ekzemplero de esperanto-revuo kaj esperanto-prospekto pri turismo, komerco aŭ kongreso.

A.- Tiel la gelernantoj povas vidi kiel aspektas nia lingvo kaj ricevas dokumentaron, kiun ili povas montri al la personoj, kiuj moketas pri ilia interesiĝo por esperanto.

Cl.- Ni opinias, ke tro ofte, instruante esperanton, oni forgesas paroli pri la disvastiĝo de la lingvo internacia. Alifoje la instruistoj troigas tiun disvastiĝon. Por reagi kontraŭ tiuj du tendencoj ni provas doni kelkajn statistikojn.

A.- Bedaŭrinde la statistikoj rapide malaktualiĝas. Rapide ili eksdatigas libron. Sed nian programitan kurson ni eldonos sub formo de kajeroj kaj aldonaj flugantaj folioj. Pro tio ni ĉiam povos ŝanĝi la foliojn, kiuj malaktualiĝis.

Cl.- Se foje ni eldonos tiun kurson sub formo de libro, ni almetos adreson, por ke la kursanoj povos ricevi aktualan dokumentaron.

A.- Tiel ni povos akiri la adresojn de la novaj esperantistoj, kion ni povas fari ĝis nun ricevante la testfoliojn de niaj kursanoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-